

La domoj Jaoul de Le Corbusier (apud Parizo)

La domoj Jaoul “A” kaj “B” estis konstruitaj inter 1953 kaj 1955, en la komunumo Neuilly cĉ Sejno apud **Parizo**, far la arkitekto Charles-Edouard Jeanneret, konata kiel **Le Corbusier**, por André Jaoul kaj lia filo Michel.




Fasado de la domo B el la korto

Tiuj domoj faritaj el brikoj kaj betono, estas duetaĝaj, kaj aplikas la regulojn de la “Modulo”, sistemo de harmoniaj mezuroj por la konstruaĵo, kreita de Le Corbusier kaj liaj kunlaborantoj, kiu kunigas la oran nombron kaj la homajn dimensionojn. Unu apartaĵo de tiuj domoj estas la uzo de volboj el plataj tegoloj kaj portantaj murojn el brikoj, kio ne similas la esprim-manieron de Le Corbusier.


La ora nombro estas ofte notita “f”

$$\varphi = (1 + \sqrt{5}) / 2$$

$$\varphi = 1.618\,034\ldots$$



Ora nombro: facile kalkuleblas Unue, oni adicias du sinsekvaj ciferon de la fama listo de Fibonacci por trovi la sekvan, tiel: 0; 1; 2; 3; 5; 8; 13; 21; 34; 55, ktp. Due, prenu vian kalkuletilon kaj dividu ciferon el la listo per la antaŭa: ĉiam aperos preskaŭ la sama kvociento. Ekz. $8/5 = 1.6$ aŭ $21/13 = 1.615$; aŭ $55/34 = 1.617$. Jen nombro por harmoniaj proporcioj!




Transversa sekcio tra la du volboj



La kuirejo kun la eta volbo

Kelkdekoj da jaroj post la konstruado, André Malraŭ (Andre Malro), tiutempa franca ministro de la Kulturo, registris la domojn kiel historiajn monumentojn. La domoj estas privataj, kaj nur malofte viziteblaj.



La domo B (infanoj) dum konstruado.

Tiu kazo estas unu el la plej gravaj postmilitaj problemoj, kiujn Le Corbusier devis solvi: tereno supersarĝita de kontraŭdiraj reguloj, malsimpla programo, tre limigita buĝeto, dum la privata konstruado estas neeviteble pli multekosta.

Le Corbusier decidis uzi materialojn plej simplajn, plej kutim-uzajn brikojn, platajn tegolojn, **katalanajn volbojn** konsistantajn interalie el videblaj plataj tegoloj (volboj starigataj sen ŝelaĵo), tegmentoj kovritaj per herbo.

Aplikado de “Modulor” per elekto de 3 ĉefaj dimensioj: la du spanoj de 3,66 m kaj 2,26 m; la alteco de 2,26 m sub lintelo, superata per volbo. La planko el ordinaraĵaj plataj tegoloj, kaj la katalanaj volboj el la samaj ordinaraĵaj plataj tegoloj. La spino de interna muro el ordinaraĵaj videblaj brikoj, trairas tra la tuta domo; la eksteraj muroj el brikoj, videblaj nur de ekstere, de interne duobligitaj kaj ŝmiritaj per gipso por eviti kondensaĵojn.



Vidaĵo al la salono ^

Unu el liaj kunlaborantinoj, Edith Aŭjame, arkitekto, kun lia permeso, kopiis la **du volbojn** de la domoj Jaoul, por kovri la du lastajn etaĝojn de domego, en kiu ŝi loĝis kun sia familio, strato Bartholdi, en Boulogne-Billancourt (Boulonjo-Bijankur), apud Parizo.

Ŝi ankaŭ konstruigis la volbojn far la sama entreprenisto, kiu konstruis la domojn Jaoul. Jen bildo de la salono de tiu apartamento.



Apartamento AUJAME : vidaĵo de la salono sub la granda volbo

Claude Bensimon.